

ELNA NEWSLETTER

NEWS OF THE LANGUAGE PROBLEM AND ESPERANTO AS A SOLUTION

Published by the Esperanto League for North America. January-February 1974.
Editor: Charles R. L. Power. Editorial Committee: Robert Bailey, Margaret Hagler, Dorothy Holland, Jonathan Pool. Includes section in Esperanto, Bulteno, sent to ELNA members only.

CONSTRUCTION ON TOWER OF BABEL RENEWED AT UNITED NATIONS

With the entry of a delegation from the People's Republic of China into the UN, the period of four working languages has been drawing rapidly to an end. According to an article in the Los Angeles Times of 24 Nov. 1973, six working languages will probably be necessary in the very near future.

Mandarin Chinese is currently the only one of the five official languages of the UN which has not yet received the supreme status of "working language." In order to help the world body save the considerable costs involved in translation and interpretation, the former Chinese delegation, unseated in 1971, used English much of the time. This arrangement was considered unacceptable by the current delegation, which is now pressing for full "working language" status.

Additional problems are presented by the ever-stronger plea to grant the same status to Arabic, spoken by eighteen member nations. The article points out that interpreters from Mandarin to Arabic and vice versa are far from plentiful in the United States.

Malcolm S. Adiseshiah, Deputy Director-General of UNESCO, in his book UNESCO: The international role of the university, has called attention to the fact that the cost of translating one page into just four languages would suffice to feed an inhabitant of India for an entire year. How many resources will be squandered with six?

ELNA CONGRESS 1974 SET TO COINCIDE WITH EXPO '74 WORLD'S FAIR IN SPOKANE

The League's 22nd Annual Congress will enjoy conditions exceptionally favorable to the mixing of business with pleasure. It has been set for Spokane, Washington, 21-23 June, during which time the EXPO '74 World's Fair will be in full swing.

An invitation to the Congress has been extended by ELNA President E. James Lieberman to a delegation of Esperantists from the People's Republic of China. The invitation was made through the President of the Chinese Esperanto League, Deputy Minister of Culture Hu Yü-chih.

For those who wish to "see America first," a more inviting summer vacation would be difficult to imagine. A registration form can be found on page E-5 of the Esperanto section of this issue. Don't miss your chance for a great holiday combined with serious work for Esperanto!

ELNA CONGRESS IN CHICAGO

The 21st Annual Congress of the Esperanto League for North America took place in Chicago, Illinois, 27-29 December 1973. Its chief order of business was provided by the establishment of the League's Central Office. It also appointed a committee to nominate candidates for the Board of Directors, an editorial committee to supervise this Newsletter, and an administrative committee for the Central Office. Detailed minutes of the Congress can be found on page E-1, in the Esperanto section of this issue.

TOP-LEVEL ESPERANTO COURSES AT SAN FRANCISCO STATE UNIVERSITY

This summer, for the fifth consecutive year, William Auld, M. A., will arrive from Scotland to give a series of high-powered courses in the international language at San Francisco State University. This year Duncan Charters, an expert in instructional methodology and phonetics, will give two courses of his own and also assist in the courses given by Mr. Auld.

There will be three three-week courses in beginning, intermediate and advanced Esperanto. Participants will enjoy the attractive option of spending the third week with Mr. Auld at the 59th World Congress of Esperanto in Hamburg, Germany. Those who prefer to remain will be taught by Mr. Charters, who will teach the entire intermediate course.

An exciting new course is the two-week "Methods of Teaching Esperanto," given by Mr. Charters. This course is designed to relate current thinking in foreign language education to the teaching of Esperanto. There will be opportunities for micro-teaching, and topics such as individualized instruction and the teaching of culture will be specifically studied in the context of Esperanto teaching. The format will be flexible to accommodate the needs and interests of both the experienced teacher and the novice.

A special feature of the advanced course will be study of the Esperanto translation of Shakespeare's Twelfth Night, done by Mr. Auld himself and to be performed at the Hamburg Congress. Mr. Auld is one of the outstanding talents of the world Esperantist community, having written poetry, reviews, columns, several beginning and advanced Esperanto textbooks, et cetera.

WOOD SPEAKS AT IOWA STATE CONFERENCE

Dr. Richard E. Wood of the Department of Foreign Languages and Inter-Departmental Program in Linguistics at Louisiana State University, Baton Rouge, was a guest speaker at the Eighth Annual Institute on World Affairs, held at Iowa State University, Ames, Iowa, in December 1973. Within the framework of the Institute's theme, "World Without Borders," he spoke on "The Language Problem—Is Esperanto the Answer?"

He also gave presentations on Esperanto and his other areas of research and

publication activity, pidgin and creole languages, language contact, language planning, and interlinguistics, before classes and faculty meetings of the Iowa State University Department of Foreign Languages and Program in Linguistics. He was interviewed on the topic of Esperanto over the University's powerful AM and FM radio station, WOI, and the interview and text of his talk may be made available to all members of the National Public Radio educational network.

The visit was arranged by Daniel Raasch, an energetic young Esperanto activist and student at Iowa State.

OUTSTANDING REGIONAL CONGRESS IN NEW ENGLAND

The New England Regional Esperanto Congress convened at the Berkshire Community College in Pittsfield, MA, from 30 November through 2 December, with participants from widely separated areas of New England and New York, of every age group from the teens to the seventies, and representing three colleges of the region.

The guest of honor at the Congress, Marjorie Boulton of England, lectured on the international language in advance of the Congress at North Adams State College and at Hoosac Valley High School in Adams, Massachusetts. She addressed the Congress on several occasions and contributed richly to its deliberations. Miss Boulton, an Oxford scholar and contributor to the Encyclopaedia Britannica, has written prolifically in Esperanto, with poetry, plays, short stories, and a biography of Dr. L. L. Zamenhof, the originator of Esperanto, whose 114th birthday was observed at the Congress banquet.

The Congress's theme was "Esperanto in the Schools." A paper was delivered, "Theoretics on the Teaching and Application of Esperanto in the Schools and Colleges." The climax on this theme was struck with the twin, mutually complementary announcements of: 1) the acknowledgement of Esperanto as a language fulfilling the foreign language requirement at a prestigious college, Dartmouth; and 2) the teaching of a formally credited course in a local high school, Hoosac Valley High. The first was proclaimed and explained by Kevin Carmody, leader of the small but diligent student group which engineered the feat at Dartmouth. The second was announced by Allan C. Boschen, instructor of the course at Hoosac Valley High. They compared notes in some depth.

PROTOKOLO DE LA 21A ELNA-KONGRESO

Ĉeestis la aferkunsidon Bob Bailey, Duncan Charters, Pat Charters, Kent Jones, Gigi Giguere, Jim Lieberman, Julie Regal, Bob Runser kaj Dick Sandberg. La aferkunsido:

1) akceptis protokolon de la 20a ELNA-Kongreso sen laŭtlegado;

2) akceptis resum prezentadon de la komitataj raportoj, kiu nepre aperos baldaŭ en la Liga organo;

3) akceptis jenajn novajn membrojn de la Estraro: Peggy Linker (kasistino), Al Estling, Kent Jones kaj Charles Power;

4) subtenis decidojn de la Estraro pri ELNA-Kongreso en Spokane, ELNA-kotizoj, kaj la Centra Oficejo de ELNA en San Mateo, Kalifornio, sub jena Gvida Komitato: Bob Bailey, Bill Schulze kaj Cathy Schulze;

5) nomis Kandidatigan Komitaton konsistantan el Mark Starr (estro), Armin Doneis, Jonathan Pool, Julie Regal kaj Bill Schulze;

6) proponis:

A) ke la sumo \$1 031,26 pagita al ELNA kiel profito el la Universala Kongreso en Portland metiĝu en novan kason por la Centra Oficejo;

B) ke la sama sumo pagita al la Loka Kongresa Komitato kiel profito el la Universala Kongreso en Portland metiĝu parte aŭ tute en la kason por la Centra Oficejo laŭ la bontrovo de la LKK;

C) ke ELNA eldonu kunligitan Newsletter/Bultenon sesfoje jare, kun Newsletter redaktita de Dick Sandberg kaj Bulteno de Charles Power, kunlabore kun Redakcia Komitato konsistanta el Bob Bailey, Marge Hagler, Jonathan Pool kaj Dorothy Holland;

Ĉ) ke la Estraro kuraĝigu Charles Power pri la plano eldoni ELNA-Jarkajeron;

D) ke la membraro esprimu dankegon al Cathy kaj Bill Schulze pro la netaksebla, ege kompetenta laboro por Esperanto dum la pasintaj jaroj;

E) ke ELNA oficiale invitu reprezentantojn el la Ĉina Popola Respubliko al la ELNA-Kongreso en Spokane, kaj klopodu aranĝi viziton de Usonaj Esperantistoj al Ĉinio;

F) ke ELNA daŭrigu ekspozicion ĉe MLA en la kadro de Literaturo kaj Lingvistiko ĉe Nov-Jorko en 1974, kun

Preparkomitato konsistanta el Julius Balbin, Jim Lieberman kaj Jonathan Pool;

G) budĝeton.

CENTRA OFICEJO JAM FAKTO

La Ligo nun havas tion, kion ĝi jam de longe bezonis: unu lokon kiu prizorgos libroservon, informservon, kaj la Ligan organon. Estas multaj historiaj kialoj, pro kiuj tio ne okazis antaŭe, sed pri ili ne necesas nun diskuti. Ni prefere frontu la estontecon. Per la nuna aranĝo la tago de la fina venko konsiderinde pliproksimiĝas, ĉar tute aparte de ia ŝovinismo nacia, estas klare, ke Usono ludas kaj ludos gravan rolon en la monda kulturo. Por ke ĝi ludu rolon ankaŭ en la plej grava realigo de monda kulturo, lingvo internacia, ELNA devas esti forta.

Malgraŭ la atendoj raportitaj en la lasta Bulteno, ne eblis, pro urbozonaj reguloj, lui ejon kie la Direktoro povus kaj loĝi kaj labori. Anstataŭe, estis elektita ampleksa, digna oficejo sur la dua etaĝo de komerca konstruaĵo en San Mateo. La fizika adreso de la oficejo estas 231 Second Avenue, Suite 201. Oni bonvolu nek uzi tiun adreson por poŝtaĵoj, nek veni vizite sen antaŭa anonco. La telefona numero estas 415-343-3844.

La poŝta adreso restas P. O. Box 508, Burlingame, CA 94010. Tiun poŝtkeston uzas kaj la Direktoro kaj ges-roj Schulze, ĉe kiuj la Libroservo provizore restas ĝis ELNA faros definitivajn aranĝojn pri transpreno.

Financa subteno estis petita en la lasta numero, kaj kelkaj kontribuoj jam envenis. Dankon al la kontribuantoj!

9A ESPERANTO-PACIFIKA KONFERENCO, APRILO 1974, LOKIĜOS EN TIĤUANO

La plej longtradicia el la regionaj renkontiĝoj de usonaj esperantistoj migros al suna Meksikio ĉi-jare. La 9a Esperanto-Pacifika Konferenco okazos en la hotelo El Conquistador, iom ekster TiĤuano, de la 5a ĝis la 7a de aprilo 1974.

La temo de la Konferenco estos inter la plej gravaj: Informado pri Esperanto. Seriozaj diŝkutoj sendube kontribuos al la progreso de niaj labormetodoj. Kvankam la anaro de la Esperanto-Pacifikaj Konferencoj emas veni plejparte el Kalifornio, ĉiuj kun ideoj kaj deziro ilin interŝanĝi

estos bonvenaj.

Kompreneble ne ĉio estos serioza. La mondfama (?) san-diega teatra grupo "La Stranga Familio" faros prezentadon, kaj pluajn distraĵojn provizos la karlsbada kantgrupo kaj la ekskurso.

Por garantii ricevon de aliĝilo, tuj skribu al s-ro Francis E. Helmuth, 2448 Sagebrush Ct., La Jolla, CA 92037.

ZAMENHOF-FESTOJ KAJ ALIAJ KLUBAJ NOVAĴOJ

Ĉiujare, tra la tuta terglobo, esperantistoj observas la datrevenon de la naskiĝo de Lazaro Ludoviko Zamenhof, ĉu ili nomas lin "kreinto," ĉu "iniciatoro" de nia lingvo, ĉu eĉ "nia kara majstro."

La Esperanto-Societo de Chicago okazigis sian Zamenhof-Bankedon en la kadro de la 21a Kongreso de nia Ligo, vendrede, la 28an de decembro.

Simile agis la novangluja movado, pri kies sukcesplena regiona kongreso oni legu aliloke en ĉi tiu numero. Ĝia Bankedo okazis la unuan de decembro, kiam la ĉeestantaro ĝuis prelegon de Marjorie Boulton pri d-ro Zamenhof. Ŝi prelegis pri li ankaŭ la postan matenon, kiam ŝi kaj John Lewine havis la honoron prediki ĉe la unitariana preĝejo de Pittsfield.

La prediko de d-ro Lewine ankaŭ konvenis al la okazo, pritraktante la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj, kies kvaronjarcenta datreveno okazis la 10an de decembro 1973. Tiu evento ankaŭ ricevis pritrakton ĉe la Zamenhof-Festo en Nov-Jorko, kie R. L. Harry, Ambasadoro de Aŭstralio al Bonno, F. R. Germanujo, diris i. a.: "Mi havis la honoron, kiel juna diplomato en la aŭstralia delegitaro, esti membro de komitato en Nov-Jorko prezidata de s-ino Eleanor Roosevelt, komitato kiu preparis la tekston de tiu Deklaracio. Kun la helpo de d-ro Solzbacher, mi faris la unuan tradukon en Esperanton. Mi tre ĝojas, ke dank' al tiu traduko, eldonita en Esperanto-Revuo de Nord-Ameriko, kaj al postaj tradukoj eldonitaj de UEA, dekmiloj da homoj en multaj landoj lernis pri la homaj rajtoj proklamitaj en tiu gravega dokumento. Mi kredas, ke nia Esperanto-Movado povas, per tiaj tradukoj, fari tre utilan kontribuon al la starigo kaj evoluo de internacia etika kodo, la esenca bazo de la internacia paco." Ĉe la Zamenhof-Bankedo de SFERO en San-Francisko, angle gastprelegis Charles Thrower,

eldonisto de interetna ĵurnalo Peninsula Bulletin, pri la Homaj Rajtoj. Fine, Karl Pov parolis pri la Universalaj Deklaracio ĉe la Zamenhof-Bankedo de la Esperanto-Klubo de Los Angeles.

La los-anĝelesa Bankedo ankaŭ ĝuis paroladojn de lokaj pioniroj, s-ino Poula Parrish kaj d-ro S. Colum Gilfillan, kiuj memoris ĉiu sian renkontiĝon kun la Majstro. Tri nordokcidentaj vaŝingtonianoj, Ellen Eddy, Mary Hammersmith kaj Elizabeth Stafford, estis invitetaj al la Zamenhof-Bankedo de la Esperanto-Klubo de Victoria, Brita Kolumbio, kaj tie aŭskultis la memorojn de ges-roj William Maier, viglaj esperantistoj malgraŭ siaj pli ol okdek jaroj. Kiel junulino, s-ino Maier renkontis d-ron Zamenhof.

Nur unu grupo, la Esperanto-Societo de Washington, D. C., sukcesis okazigi sian Bankedon ĝuste je la dato de la naskiĝo de Zamenhof, la 15a de decembro.

Interesan ideon havis la Esperanto-Klubo de San Diego, kiu invitis la lokan poldevenan komunumon al trilingva (esperanta-pola-angla) Bankedo ĉe pola restoracio, la 18an de decembro. Tie prelegis Ralph A. Lewin pri Zamenhof, Ellie Stein pri vojaĝo al Europo, kaj Frank Helmuth, Estrarestro de nia Ligo, pri ELNA kaj la nova informcentro. Corinne Goddard estris la komunan kantadon.

Nova grupo stariĝis la 6an de novembro 1973, je iniciato de Bernice Garrett. La Esperanta Klubo de Sudgolfeto havas kiel sian teritorion la regionon ĉirkaŭ Manhattan Beach, Kalifornio, sude de Los-Anĝeleso.

El Minesoto Mike Hardy, Sekretario de la Esperanto-Klubo de la Ĝemelaj Urboj, skribas: "EKĜU fondiĝis je la 19a de aŭgusto 1972, havante kvar anojn. Ĝi nun havas dek. Antaŭe estis alia E-klubo tie, kiu havis proksimume ducent anojn, sed el tiuj nur kvin (!) sciis paroli la lingvon. El tiuj kvin nur unu ankoraŭ vivas. Tiu estas D-ro Lehman Wendell, nun la plej maljuna esperantisto en Usono, kaj delegito de UEA jam pli ol kvindek jarojn. Li informas nin, ke la antaŭa E-klubo en la 'Ĝemelaj Urboj' ĉesis ekzisti dum la dua mondmilito, ĉar oni suspektis nin ne esti lojalaj pro la stranga eksterlandeska lingvo."

Ĉe la Esperanto-Societo de Nov-Jorko en januaro raportis ĝia Prezidanto, Julius Balbin, pri la lastaj seminarioj ĉe MLA

(Asocio por Nuntempaj Lingvoj), kiuj okazis proksimume samtempe kun la ELNA-Kongreso en Ĉikago. D-ro Balbin kontribuis la referaĵojn "Ĉu Esperanto estas artefarita lingvo?" kaj "La sekreta malsano de Esperanta poezio". Mark Starr raportis pri la Kongreso mem.


Prelegis Joe Gamble aŭ Ĝoŭ Gembal aŭ Ĝo Gembll aŭ Joĉjo Gemblo pri "La noma ĥaoso en Esperanto, aŭ Kio estas mia nomo kaj adreso?" ĉe la decembra kunveno de la Esperanto-Societo de Portland, Oregon. Dum tiu monato Esperanto troviĝis en ne malpli ol tri televidaj elsendoj, plejparte pro la agemo de Laurin Lewis, kiun ni baldaŭ perdos al la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio, kie li intencas labori dum almenaŭ unu jaro.

La ĉefa organizo por la san-franciska regiono, SFERO, aŭdis de Hal Dreyer liajn spertojn pri la tradukado de la fama fabelromano La Sorĉisto de Oz, de L. Frank Baum, ĉe la januara kunveno. Tie ankaŭ prelegis Gary Smith, pri longdaŭraj solvoj al la energi-problemo. Unu semajnon poste, laŭ la kutimo, SFERO okazigis sian Zamenhof-Bankedon, kie la anoj ĝuis, krom la prelego jam menciita pri la homaj rajtoj, paroladon de Duncan Charters pri la perspektivoj por nia lingvo, informojn pri la someraj kursoj okazontaj ĉe San-Franciska Ŝtata Universitato de d-ro Richard L. Trapp, esperantan koncerton de sperta pianludisto B. J. Balcar, kaj muzikan kaj poezian programon de la gelernantoj de Abbott Middle School, kiujn instruas Doris Vallon.

Ĉe la januara kunveno de la Esperanto-Klubo de Los Angeles, Sandor Bako, aŭtoro de Tiaj Ni Estas, parolis pri sia somera vojaĝo al Eŭropo, kie eĉ la multaj bonvolemaj esperantistoj, kiujn li renkontis, ne povis savi lin de kelkaj problemoj. Unu el la plej gravaj estis la fakto, ke ĉe la pasporto, li asertis sin hungare naskita, kvankam intertempe la koncerna urbo transiĝis al Ĉeĥoslovakio. Ĉe la sama kunveno Karl Pov parolis pri la nova Centra Oficejo de ELNA, al kiu li estis tuj veturonta, kaj ankaŭ deklamis sian tradukon de "La militpreĝo" de Mark Twain.

Semajno de
Internacia
Amikeco

(vidu p. 6)



Amikeco trans limoj

La lernantoj de Esperanto ĉe Liceo Chevrollier, kunlabore kun la Esperanto-Klubo de Angers, nun preparas ekspozicion pri "Sporto en la Mondo" por majo 1974.

En tiu liceo, jam de pluraj jaroj, Esperanto-rondo iom post iom kreskis ĝis atingo de altranga pozicio inter la neoficialaj kulturaj organizaĵoj de la lernejo. Ĉi-jare, pli ol kvardek lernantoj sekvas la Esperanto-kurson kaj esperas kiel eble plej baldaŭ partopreni la mondan vivon pere de la internacia lingvo.

Ĉar la pasintjara ekspozicio pri "Kopernik kaj Pollando" multe plaĉis al la lernantoj kaj vekis profundan intereson ĉe la cetera lernantaro, la profesorado kaj la publiko, ni decidis ankoraŭ ĉi-jare aranĝi similan ekspozicion, se eble, same altnivelan.

Tiu manifestacio espereble montros denove, ke Esperanto estas potenca instrumento de cirkulado de informoj kaj ideoj, de konsciigo pri nuntempaj problemoj, de internacia kompreniĝo.

Tiacele, ni petas vian kunlaboron por trakti diversajn aspektojn, en via lando, de la elektita temo, kies ĉefaj eroj estas jenaj:

- Sporto por elitoj au sporto por ĉiuj;
- Sporto profesia au sporto amatora;
- Sporto kaj sano: trejnado, medicina kontrolo, olimpiaj ludoj;
- Taga vivo de iu ĉampiono, kiun vi eble konas;
- Ŝtata aŭ privata helpado, demokratigo de iuj sportoj, ekzemple rajdarto, teniso, velsporto;
- Sporto kaj komerco;
- Sporto kaj naciismo;
- Sporto kaj arto (sketado, dancarto);
- Sporto en la lernejo: horaro, rilatoj kun eksterlernejaj sportaj organizaĵoj....

Tiu listo estas nur ideodona. Estos bonvenaj, kompreneble, ĉiuj bildoj, studoj aŭ statistikoj, precipe se ili prezentas belan aspekton aŭ originalecon aŭ iun ajn aŭtentikan signifon.

Se necese, pruntedonitaj dokumentoj estos resenditaj. Raporto pri la rezulto estos publikigita.

Sendu materialojn al: Esperanto-rondo, Liceo Chevrollier, 49000 ANGERS, Francujo.

LETEROJ AL LA REDAKCIO

De Pierre L. Ullman:

La letero de samideano D. K. Jordan en via decembra numero multe interesis min. Tamen, miaopinie, ŝajnas maljuste nomi "Ms."-on fuŝvorto.

La vorto "Ms." necesas. Ĝi ekzistas kaŭze de la feminisma movado, kiu estas vere multe pli grava por la monda paco ol la Esperanta movado. Herbert Spencer rimarkas en siaj Principoj de Sociologio (parto 3, ĉapitro 10), ke ju pli militisma estas socio, des malpli da rajtoj havas la virinoj. Kiam virinoj ricevos tiom da rajtoj, kiom havas viroj, inkluzive precize ekvivalentajn titolojn, tiam estos ni en la vojo de la paco.

Ni usonanoj povas fieri, ke en nia lando ekzistas virinoj, kiuj rompadas lingvajn praktikojn, elpensante kaj preskaŭ devigante novan uzon spite al la rutinuloj. Kiuj, pli ol Esperantistoj, devus povi kompreni, ke nova lingva uzo enkondukas novan senton? Ne plie estas "Ms." fuŝvorto, ol Esperanto estas fuŝlingvo.

De Charles F. Post:

Mi ĵus ricevis mian kopion de ELNA-Bulteno, kaj unue mi volas gratuli vin pro bonaspekta kaj interesa revueto. Tuj frapis miajn okulojn, ke vi ĝustigis la liniojn tiel, ke la dekstra marĝeno ebeniĝas. Tia ekstra laboro certe plibonigas la aspekton de la presajo.

Post kiam mi emeritiĝis antaŭ kelkaj jaroj, mi verkis malgrandan anglan rakonton kaj mi mankompostas kaj presas ĝin en libreton ĉe malgranda presejo de mia najbaro. Nu, poste mi Esperante tradukis la rakonteton kaj S-ro Lewis Cook de Ohio kritikis la verkon por mi. Nun mi povas presi ankaŭ Esperantan eldonon, sed estas grava malhelpo—manko de tipoj kun Esperantaj supersignoj.

Kompreneble estas aliaj rimedoj por presi la rakonteton krom la autentika presado. Kiam mia edzino verkis infanan rakonteton, mi Esperante tradukis ĝin kaj presis kelkajn ekzemplerojn per la gelatena procedo. Poste mi sendis kopiojn al miaj Esperantaj korespondantoj—fakte korespondanto en Nederlando skribis, ke li retradukis ĝin al sia lingvo por legi al siaj nepinoj. Sed la pli zorga gelatena procedo tute ne aspektas bone kiel aŭtentika presado—kaj mi estis presisto dum

kvindek jaroj....

Kion mi faru? Ĉar mi estas nur malriĉa emerito, mi ne havas monon por importi taŭgajn tipojn el Eŭropa lando. Ĉu iu Esperantisto scias, kie estas neuzata tiparo en Usono, kiun mi povus akiri sen monpago? Maljuna Esperanta presisto volas presi sian rakonteton. Ĉu li povos?

(NdlR: Se iu scias pri tiaj prestipoj, li aŭ ŝi skribu al s-ro Post ĉe 1150 Pico Avenue, Pacific Grove, CA 93950.)

LINGVA ANGULO de Salber Jonroŝ

Unu el la plej urĝaj celoj de la movado estas meti la lingvon internacian en la lernejojn. Bedaŭrinde, ne ĉiuj usonaj esperantistoj uzas la ĝustajn terminojn por diskuti la problemon, pro tio, ke la edukaj institucioj de Esperantujo havas devenon eŭropan.

La plej malalta nivelo, preter la infanĝardeno, nomiĝas, ĝuste kiel en la angla, elementa lernejo. Tiu periodo ĝenerale daŭras iom malpli longe en Eŭropo ol en Usono, eble kvar au kvin jarojn. Poste venas diversaj eblecoj, depende de la kapableco montrita ĉe la koncerna lernanto. Oni povas ekzemple resti en la elementa lernejo dum eble kvar pliaj jaroj kaj tiam eniri metilernejon. Au eble ia mezlernejo taŭgas, de kie post ses jaroj oni progresas al faklernejo. Aŭ, se oni estas tre inteligenta kaj tre bonŝanca kaj—plej grave—tre laborema, elstarulo, oni eniras la mezlernejon kiu nomiĝas gimnazio au liceo. Tiu ĉi mezlernejo estas la plej proksima ekvivalento de nia high school. Eŭropanoj tamen pretendas—eble prave—ke gimnazia aŭ licea diplomito ĝenerale havas pli vastan scion ol bakalaŭro en la usona sistemo. Tio ĉi povus esti rezulto de la fakto, ke la eŭropaj lernantoj ordinare vizitas la lernejon ne kvin sed ses tagojn semajne.

Tiu, kiuj deziras pli altajn studojn, devas diplomigi de la mezlernejo per tre malfacila ekzameno, post kies sukcesa plenumo oni fariĝas abituriento. Malsukceso ĉe tiu ekzameno fojfoje kaŭzis sinmortigon.

La altlernejo al kiu tiu ekzameno kondukas estas kolegio aŭ universitato. Fakte, ĉiuj studoj post la abiturienta ekzameno estas altlernejaj studoj. Do, oni nepre ne traduku nian usonan high school per altlernejo, nek inverse!

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO JAM
PROKLAMITA EN DU URBOJ KAJ UNU ŜTATO

Kiel ni atentigis en la lasta numero, la lasta plena semajno en februaro—Ĉi-jare, de la 18a ĝis la 24a de tiu monato—estas la Semajno de Internacia Amikeco, jam tradicia festperiodo de la tutmonda esperantistaro. En Usono la Semajno ofte celebriĝas per proklamoj de diversaj urb-estroj, kiujn instigas lokaj movadanoj. La maniero ne estas malfacila. Oni nur skribu al la koncerna persono leteron, kiu priskribas la Semajnon kaj la mondskalan intereson, kiun havas la esperantistoj pri ĝi. Kun la letero estas saĝe enmeti specimenan tekston de proklamo, laŭeble adaptitan al tiea cirkonstancaro.

Ĝis nun la Centra Oficejo scias pri proklamoj en sia propra urbo, San-Mateo, de urbestro Floyd E. Welch, en San-Francisko, de urb- kaj grafland-estro Joseph L. Alioto, kaj en Vaŝingtonio, de ŝtatestro Daniel J. Evans.

59A UNIVERSALA KONGRESO — HAMBURGO, 1974

La ĉeftemo de la 59a Universala Kongreso de Esperanto estos "Naciismo kaj internacia kunlaboro en la nuntempa mondo". Spegulos tiun temon almenaŭ du el la temoj por la Oratora Konkurso, en kiu junaj geesperantistoj ĝis inkluzive 28-jaraj konkurencos por la tri premioj de respektive 100, 70 kaj 40 guldenoj. La jam fiksitaj temoj estas:

1. Naciismo kaj internaciismo en mia lando;
2. Ĉu internaciaj sportaj konkursoj kontribuas al internacia amikeco aŭ incitas naciismon?;
3. Kion volas la junularo en la Esperanto-movado?;
4. Perforto en literaturo kaj sur ekranoj.

La leganto de ĉi tiu periodaĵo esperable havos grandan intereson pri la temo de la tiel nomata "debato" (kiu pli ĝuste nomiĝus "forumo"): "Landaĵ revuoj en Esperanto—ĉu utilaj?" Unuflanke la bezono de enlanda organiza informilo kaj nacilingva informmaterialo, aliflanke la kontraŭdiro inter la ideo de landa revuo kaj la internacieco de la esperanta gazetaro—tio formas la kernon de la demando, kiu multe okupas la aktivulojn de la nuntempaj landaj organizaĵoj. Ĉu la ĉi-jara "debato" montros la vojon al solvo?

Bulgara Esperanto-Teatro el Sofio provizos la hamburgan Teatran Vesperon per klasika franca komedio, "La Barbiro de Sevilla" (1775) de Beaumarchais. El tiu komedio Rossini poste faris la mondfaman operon.

La Kongreso daŭros de la 27a de julio ĝis la 3a de aŭgusto. Por aliĝilo skribu tuj al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Kiel kutime, Eŭropo ĝuos leonan porcion de altnivelaj Esperanto-aranĝoj.

Dum la semajno antaŭ la UK, esperantistoj de ĉiu lingva nivelo povos profiti de la kursoj ĉe la Internacia Altlernejo en Helsingør (Elsinoro), urbo de Hamleto. Estos entute kvar kursoj: elementa, laŭ la rekta metodo de Friis; konversacia; perfektiga; kaj prepara por Friis-metodaj geinstruistoj. Ĉiuj kursoj finiĝos antaŭtagmeze por fariĝi—ekskursoj! Ne nur la kastelon Kronborg de Hamleto oni vizitos, sed ankaŭ plurajn aliajn vidindaĵojn. Estos karavano rekte de la kursoj al la Universala Kongreso. Por pliaj detaloj, skribu al: s-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, DK-8230 Åbyhøj, Danlando.

Post la Kongreso estos almenaŭ kvar elstaraj aranĝoj. La Oficiala Postkongreso okazos en la mezepoka urbo Kronach, kie naskiĝis la pentristo Lucas Cranach (1472-1553). Ĝi proksimas al Germana Demokratia Respubliko kaj Ĉeĥoslovakio.

TEJO okazigos la 30an Internacian Junularan Konferencon en la trankvila universitata urbo Münster, kie ĝi pritraktos la temon "Junularo kaj edukado", de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto.

Ekster F. R. Germanujo lokiĝos eble la plej prestiĝa el la postkongresaj okazaĵoj, la Someraj Universitataj Kursoj ĉe la Universitato de Lieĝo en Belgio. Ok instruistoj el ses landoj faros lekciojn pri diversaj temoj de biologio, ĥemio kaj socilingvistiko. Jen io vere tro eksterordinara — aŭtentikaj universitataj kursoj ne de Esperanto, sed per la internacia lingvo. Kromprogramo konsistos el perfektiga Esperanto-kurso, ekskursoj, sportado, filmvesperoj ktp. Stipendioj estas haveblaj. Por pliaj informoj skribu al Someraj Universitataj Kursoj, Boîte Postale 9, B-4000 Liège 3, Belgio.

La 47a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda troviĝos en Bergamo, Italio. Pli detalaj informoj aperos ĉi tie baldaŭ.

PRI LA LIGA ORGANO

ELNA-Bulteno nun estas sekcio de ELNA Newsletter, kies tuto estas redaktata de Charles R. L. Power, Direktoro de la Centra Oficejo de ELNA. La antaŭa redaktoro de Newsletter, Richard Thorsten Sandberg, devis demisii pro troa profesia okupiteco. Li ne foriris sen lasi gravajn postsignojn, precipe en rilato al la aspekto de la organo, kies eblecojn de ne tro kosta plibeliĝo li lerte demonstris.

La Redaktoro nun estas gvidata de Redakcia Komitato nomita ĉe la 21a Kongreso de ELNA, kiel oni povas vidi en la Protokolo al tiu Kongreso. Li rilatos kun po du el la kvar anoj de la Komitato ĉe ĉiu numero.

En la venonta numero aperos prezaro por pograndaĵoj mendoj de la anglalingva sekcio de Newsletter, kiun la membroj ne nur mem legu, sed disvastigu al taŭgaj instancoj ekster la movado, ĉu edukaj, ĉu politikaj, ĉu alispecaj. Ni memoru, ke ELNA ekzistas ne nur por Esperantistoj, sed, multe pli grave, por antaŭenigi la lingvon internacian. Necesas do rilati kun la ĝenerala publiko, kaj por tio ni bezonas aktualan anglalingvan materialon. La celo de Newsletter, t. e. de ĝia anglalingva sekcio, estas provizi tian materialon. Ni atendas la apogon de ĉiuj sinceraj kaj seriozaj mondlingvanoj.

AŬD-VIDA SEKCIO DE ELNA

Por ampleksa listo de etkoste prunteblaj sonbendoj, skribu al s-ro H. K. Ver Ploeg, E. 321 - 19th Avenue, Spokane, WA 99203.

ANONCETOJ

(NdLR: Da korespondpetoj ni havas multe tro por doni spacon al ĉiuj. Interesitoj memoru, ke la respondeculo, kiu helpas al vi trovi tian korespondanton, kian vi deziras, estas f-ino Ellen A. Lewis, 15 Salisbury Road, Brookline, MA 02146.)

S-ino Oĉi Jasuko, 34-jara dommastrino kun tri filoj, 794, Japanujo, Imabari-si, Tokiwamati, 9 tyōme, volas korespondi kun usonanino.

S-ro Walter Zelazny, 23-jara fraulo, studento de jurscienco, ul. Piastów 11/81, Rzeszów, Pollando, volas korespondi pri poezio, belliteraturo kaj sociologio. "Esperanto obsedis min tute."

S-ro Kim Sei-Youl, 26-jara universitata studento, 505-1050 52 Ban I-Dong, Keorim-Dong, Kwang-Ju City, Junnan, Respubliko Koreujo, volas korespondi.

Dek unu gelernantoj, de la 5a ĝis la 7a klaso, volas interŝanĝi bildkartojn, portretojn, poŝtmarkojn ktp. Interesiĝas pri sporto, literaturo, filmoj, muziko. La 23a Ĝenerala Lernejo, Esperanto-Grupo 3534, Miskolc, Jáncsics tér. 1, Hungario.

S-ro Frant. Rajský, 57-jara fervojisto, Hromořadni 2, 690 02 Břeclav 2, Ĉeĥoslovakio, volas korespondi.

Informojn pri Sennaciismo kaj Sennacieca Asocio Tutmonda sendas la Landa Peranto de la Sennaciista Frakcio, Karl Pov, 215 Second Avenue, Ĉambro 206, San Mateo, CA 94401.



EN SOVAĜA SAN-MATEO

La Direktoro de la Centra Oficejo sukcese plenumas sian unuan oficialan devon —viziti la kurson ĉe san-matea mezlernejo Abbott Middle School, kie Doris Vallon instruas la internacian lingvon ĉiutage. La foton ni dankas al la afabla kursestrino.

Ĉina Esperanta monata gazeto

EL POPOLA ĈINIO

Varbas abonuntojn de 1974



Abonprezo:

1 jaro US \$ 2.20
2 jaroj US \$ 3.30
3 jaroj US \$ 4.40

Abonu ĉe: Esperanto-Informcentro
P.O. Box 508
Burlingame, CA 94010

aŭ rekte ĉe Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo,
P.O. Kesto 313, Pekino Ĉi

Specimeno akirebla senpage



WILLIAM AULD KAJ DUNCAN CHARTERS

Jen la instruistoj de la someraj kursoj de Esperanto ĉe San-Franciska Ŝtata Universitato. Pri la kursoj oni povas legi sur p. 2 de la anglalingva sekcio. S-ro Charters iniciatos kurson pri instrumentoj. Tiuj, kiuj intencas aliĝi, povas jam nun rilati kun la Centra Oficejo.

Baldaŭ aperos Suplemento al la ELNA-Adresaro. Tiuj, kiuj ne aperis en la originala Adresaro sed ne volas eniri la Suplementon, bonvolu kontakti la Centran Oficejon. Dankon!

Cu vi renovigis vian membrecon en ELNA por 1974? Se ne, ĉi tio estas la lasta numero, kiun vi ricevos!

KLASIKAĴOJ DENOVE HAVEBLAJ — DUM MOMENTO!

La Libroservo de ELNA fieras anonci, ke ĝi sukcesis akiri tre malgrandan stokon de kelkaj jam de longe elĉerpitaj klasikaĵoj. Pro la fakto, ke temas pri tiaj raraĵoj, nur anoj de ELNA kotizintaj por 1974 rajtos mendi ilin, kaj nur po unu ekzemplero por ĉiu titolo.

La plej valora trezoro estas bindita dua eldono de la unua libroforma verko de la "homo homa," la forpasinta bardo de la Esperantuja kamparo, Julio Baghy. Preter la vivo (dua eld., Budapeŝto, 1931), estos dum fulmodaŭra momenteto havebla kontraŭ nur \$2,95. Ne prokrastu mendi, ĉar temas pri nur du ekzempleroj!

En iom pli granda stoko, Gösta Berling de Selma Lagerlöf, elsvedigita de Stellan Engholm, mem populara originala romanisto, estas havebla en broŝurita eldono kontraŭ \$4,95. Pli ol kvincent paĝoj, kun multaj ilustraĵoj, liveras la plej ŝatatan verkon de la sveda literaturo. La esperanta traduko aperis en 1934.

La Sorĉistino el Kastilio de Salom Asch, tradukita "el la juda" de Izrael Lejzerowicz, aperis esperante ĉe Literatura Mondo, Budapeŝto, en 1933. La traduko estis siatempe alte laŭdata pro sia lerta stilo. Kelkaj ekzempleroj estas mendeblaj po \$1,75.

Fine, el la angla venas kvar popularaj romanoj, ĉiuj binditaj: Riĉa kaj sen mono de E. Phillips Oppenheim, tr. Fred E. Wadham (L. K.), \$3,50; Judoj sen mono de Michael Gold, tr. Georgo Saville, \$2,75; Aventuroj de Marteno Drake de G. Norway, tr. Walter Severn, \$2,95; kaj Fanny de Edna Ferber, tr. Berno Fabo, \$3,95.

COURSES! COURSES! COURSES!

In answer to many requests, an overview of current Esperanto instruction in this country is provided below. The reader is asked to bear in mind that the list is by no means comprehensive, giving only a selection of the courses of which reliable reports have been made recently. These overviews will be appearing from time to time, and readers who know of courses are encouraged to inform us by way of the current chief of the statistical section of the American Association of Teachers of Esperanto, Mr. William P. Simpson, 2115 Walnut Street, Harrisburg, PA 17103.

CALIFORNIA: A social studies teacher at King Junior High School in Berkeley, Dorothy Hackbarth, is introducing her class to Esperanto with the able help of Geanne Wolff Amerayan. The Beverly Hills Recreation Department is sponsoring an evening course under William W. Glenny, President of the Esperanto Club of Los Angeles. Corinne Goddard is giving a course in Escondido. The University of California at La Jolla has an exceptionally fine course under David K. Jordan, former rector of the International Summer University, and Ralph A. Lewin, co-translator of Winnie-the-Pooh. ELNA archivist B. J. Balcar has a course at Monterey Adult School. Martha Walker is instructing a group at Napa Community College Adult School. An English teacher at Newark High School, Adrienne Blackhart, has an unofficial course there. San Diego is just bursting with courses, under Lee Edwards, Alberta Casey and William Schwartz. At an evening program of the San Francisco Community College District, William H. Schulze teaches an advanced course in one room while his wife Cathy breaks in a group of beginners in another. Doris Vallon teaches an enthusiastic class of youngsters at the Abbott Middle School in San Mateo in a daily credit course.

FLORIDA: Gizella Giguere teaches Esperanto full time at the Learning Center for Gifted Children in Tampa and at several other junior high and high schools in the Hillsborough School District.

HAWAII: All through the islands Esperanto is studied as part of a sixth-grade program in Communications in the Hawaii English Program.

ILLINOIS: The Esperanto Society of Chicago continues to sponsor courses in that city. Excellent evidence of the pedagogical utility of the international language was provided by the course at Sacred Heart of Mary High School in Rolling Meadows under Valrie Hackett. The students involved were considered to be without aptitude for foreign languages. After their course in Esperanto, counsellors found reason to urge them to further language studies. A repeat performance is now under way.

MASSACHUSETTS: Allan C. Boschen's course at Hoosac Valley High School in Adams is covered in the report on the New England Congress elsewhere in this issue. Dr. Maria Liwszyc from Poland has the help of Prof. Carlos de Jesus from Portugal in giving a course at the Fall River Public Library.

NEW MEXICO: In Gallup, Roan Orloff Stone, translator of Kahlil Gibran's The Prophet, is teaching a small class of Navaho Indians. Prof. J. A. Schufle of New Mexico Highlands University in Las Vegas has a special course for the University's Honors Program.

NEW YORK: At press time sufficiently recent reports of the many courses usually proceeding in this state were not available to the editor, except for Mark Starr's class at Bryant Adult Center in Long Island City.

OHIO: Mrs. Winnifred Brengle has found a new way of getting Esperanto into the schools. She is teaching it as a supplement to her advanced Latin class at Circleville High School. After last semester's class, several students went on to successfully complete the Elementary Examination of the American Association of Teachers of Esperanto, some with distinction.

OREGON: Site of the 1972 World Esperanto Congress, Portland has for this and for many other reasons played an important role in the U. S. Esperanto movement. But the local activists do not rest on their laurels. Hazel Heusser teaches the international language to pupils in her social studies class at Laurelhurst High School. One of the initial exercises is for the student to go down a hallway along which UNESCO's series of Human Rights posters in Esperanto hangs, and to try to guess the meaning of the text. Mrs. Heusser taught a credit course in

Esperanto teaching methods last semester at Portland State University. Now Laurin Lewis, who will be leaving for Rotterdam in April for his new position with the Universal Esperanto Association, is teaching an Esperanto course there under the auspices of the Esperanto Institute of PSU. Finally, high school students get official release time to attend Lura Chapman's course at the Portland Public Library. This is the second time around for Mrs. Chapman's course, which is repeated by popular demand.

PENNSYLVANIA: Students in William P. Simpson's course at Elizabethtown College use five texts: Teach Yourself, Auld's A First Course, About Esperanto, Esperanto por Infanoj, and the English Universities Press dictionary. This is Elizabethtown's second Esperanto course, repeated because of inquiries at the Registrar's Office. Joseph Conroy has a course going at Lincoln High School in Philadelphia.

TEXAS: Earl Bills, who has been busy getting a prodigious quantity of articles on Esperanto into the local press, is teaching a course at the University of Texas at Denton. In Houston, John Victory's course in the Junior High section of Kincaid School has been extended into the High School.

WASHINGTON: In the city which will be the site of this year's ELNA Congress, Ken Ver Ploeg teaches Esperanto at Spokane Falls Community College. Albert and Sara Ann Estling make sure that a course is always available in Walla Walla. Sara Ann just finished a ten-day class during the semester break.

ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA
P. O. Box 508
Burlingame, CA 94010
Usono/USA



NEWS PLEASE EXPEDITE

**AMERICAN TOURIST ACCIDENTALLY
"DRAFTED" INTO ISRAELI ARMY—
LANGUAGE BARRIER TO BLAME....**

David McCualsky, 24, of Athens, Ohio, spent 3½ days in the Israeli Army at the outset of last October's emergency mobilization. For his help in rescuing injured soldiers from disabled tanks, he received a military award, a silver tank medal, a cracked elbow, and shrapnel in his shin. How could this have happened? "There was a language barrier," he explains.

McCualsky was in Haifa when he decided to hitch a ride to meet some friends in Jerusalem. He found the driver of an army truck which was cruising the streets looking for troops, and asked, "Jerusalem?" "There was a language barrier and the man misunderstood me. He thought I meant that I was from Jerusalem and was ready to go to the front. He told me to get on board." He dozed off on the truck, to awaken at the sound of artillery fire on the Golan Heights. Realizing the consequences of the communications gap, he decided that "the easiest thing was to go along with the thing."

**SEMINARS AT THE MODERN
LANGUAGES ASSOCIATION**

Following the very successful seminars in Esperanto Literature and Interlinguistics at the two previous meetings of the Modern Languages Association, at New York in 1972 and at Chicago in 1973, Esperantist academicians plan to present papers at this year's meeting in New York, this coming December.

Nonprofit Organization
U.S. POSTAGE
PAID
Burlingame, CA
Permit No. 296

**Address Correction Requested
Return Postage Guaranteed**